Jen alproksimighas la komenco de septembro, kiam okazos la unua Esperanto-staĝo en Rumanio (1-5 sept. 2006).
Estas nia unua tia arangho, pro tio ghi estos nacia. Post iom da sperto, ekde venontjare, ghi farighos internacia.
Dum la stagho okazos E-kursoj por komencintoj kaj progresantoj.
Kursgvidantoj estos: Mihai Trifoi, Aurora Bute, Emil Crancau, Nicolae Macovei, Mariana Berariu.
Okazos ankau Tutlanda E-Simpozio, kies temo estas: E por la estonteco.
Sin anoncis ghis nun: Jozefo Nagy, Doru Neagu, Mihai Trifoi, Mariana Berariu, Emilia Seculin, Adrian Cocora, Adrian Savu.
La landa asocio lanchos lernolibron pri Esperanto, la kurson de nia Prof. Constantin Dominte, al kiu estas dedichita la simpozio.
La loghado (senpaga) estas en la gastejo de la Pedagogia Liceo.
La kursoj okazos en la Arta Liceo kaj la Universitato. La lastan tagon ni pasigos en la komputilejo de la Universitato.
La simpozio okazos en Aula Magna de la Universitato.
Mi sendas al vi la programon por la kursoj. Sekvos aliaj informoj chi tiun semajnon.
Bonvolu sciigi min (rete, telefone, poshte) pri la datoj de via alveno kaj foriro, titolo kaj dauro de via prelego dum la simpozio.
Venu por plibonigi vian parolkapablon kaj ghui amikan etoson! Ni atendas vin en Timisoara, komence de septembro!

Aurora Bute

Programo de la Esperanto-staĝo, Timişoara, 1-5 septembro 2006

Dato	Horo	Komencintoj	Progresantoj	Kursgvidanto Komenc./ Progres.	Kursejo
1 septembro	15	Komuna programo	Malfermo		Pedagogia Liceo
	16-17 17-18	Alfabeto, substantivo, artikolo, adjektivo	Artikolo Korelativaj vortoj	Crâncău / Bute	Arta Liceo
	18-19	Afiksoj	Korelativaj vortoj	Constantinescu / Bute	Arta Liceo
2 septembro	9-10	Afiksoj, la verbo	Akuzativo	Constantinescu / Bute	Arta Liceo
	10-11	La verbo	Refleksivo (-iĝ, sin)	Constantinescu/ Macovei	Arta Liceo
	11-12	La numeralo	Prepozicio	Beraru / Crâncău	Arta Liceo
	12.15	Komuna programo	Lanĉo de la E-lernolibro		Librovendejo “Eminescu” (urbocentro)
3 septembro	9-14	Komuna programo	Tutlanda Esperanto-Simpozio		Aula Magna-Universitato
4 septembro	14-15 / 9-10	La pronomo (persona, posesiva)	Sufikso “-ig”	Crâncău / Crâncău	Salono 149 - Universitato
	15-16 /10-11	Adverbo, prepozicio	Participo (aktiva)	Macovei / Trifoi	Salono 149 - Universitato
	16-18 /11-12	Tekstoj (analizo de afiksoj, vortfamilioj k.a.)	Participo (pasiva)	Trifoi, Bute / Trifoi	Salono 149 - Universitato
5 septembro	9-12	Komuna programo	Edukado.net, lernu!, testo, intervjuo de M.Constantinescu al la rumana UNESCO-Komisiono	Bute	Komputilejo en la Universitato